GISTO, Jan.2008.

Redaktas G.Otto Vaske
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo

0101010101010101010101010101010101010101010101010101010101010101010101010101

NIA POLIGLOTA VERKISTO

Dum la pasinta VKafo nia verkista mosxto Solon Santana enmanigis al mi kolektojn de famaj brazilaj verkistoj, inter ili, nia elstara samideano Solon. Troveblas tekstoj de pluraj anoj de UBE/RS (nacilingve, Brazila Unuigxo de Verkistoj) kies vic-prezidanto li estas. Leganto gxuas plurlingvajn tekstojn, ne nur prozajn sed ankaù tiajn laù poezia stilo. Enestas vere atentoaltiraj legajxoj. Kelkaj aùtoroj mencias Esperanton. Sam° Solon malkasxas sian talenton, multe pli altan ol lia modesta sinteno dum la Verda Kafo lasas nin diveni. Endas depreni sian chapelon liahonore, ankaù pro lia plurlingva scio. La verkistaro de UBE indas je atenta lego. Vespera leganto certe forgesos pri la kutima horo de enlitigxo! – Se niajVK-rondanoj stimulos lin, eble li kuraxos verdigi la enhavon de la libroj. Chu ni provu tikli lin?

TRISTO

La alternado de vivocirkonstancoj de homoj kaj bestoj altrudas momentojn de gxojo kaj de tristo, preskaù same kiel la morto ili estas ne finteblaj. Kun la koro peza, mi rakontas la fakton kiu kaùzis la motivon kiu estigis la neceson alpreni amaran decidon. – De pli ol dek jaroj mi tenis che mi Sxisxafon, nomitan Sxika. Sxi donis al mi kaj al gefamilianoj grandan gxojon chefe kiam sxi estis pli juna, kune kun kompano samagxa. Kvar jarojn antaùe li mortis pro malsano. Ambaù bestoj kutimis akompani min en la fundon de la tereno kaj mem povis elekti tenerajn mangxajxojn laùplache kaj

petoli. Lastatempe sxi suferis doloron che la genuoj, versxajne malsano komuna al sxafoj (memoras Dolly, Londono?) kaj ne plu kuniris en la promenoj, pli ol 10 aù 20m. kaj rezigne reiris al sia stalo. Nuntempe kiam mi komencis piediri al la pasxtejo sxi starigxis kaj triste blekadis, por signifiki: helpu min iri kune. De tiam mi zorgis trovi por sxi frandajxojn, certajn gresojn, branchetojn, fruktojn, avokadajn kernojn krom restajxoj el la kuirejo (rizo, manioko, maizo, ktp.). Kiam mi promenas ie kaj ekvidas bongustajxojn, nepre mi memoras sxin.

En la dimancho 12/01 sxi ne plu povis starigxi, ne remachis, nenion volis mangxi ech ne la plej sxatatajn mangxajxojn.Trinkis nur kelkajn glutojn da fresxa akvo. Sxi provis starigxi sed nur la postaj piedoj obeis. Sxi falis kaj balancadis la kapon sxajne por akiri impulson aù por komuniki ke sxi ne plu kapablas starigxi kaj ne eltenas la dolorojn. Kunvokitaj, gefamilianoj kaj veterinaro, la verdikto sonis: sxi agxas preskaù 20 jarojn, ne plu kuraceblas. Tiam okazis la amara decido, nome eùtanazio. Amarega pilolo...neniam plu aùdi la amikan vochon de mia sxatbesto. Mi ne kasxas, ke la pezego elpremis larmon. La bonanima Sxika ne plu ekzxistas. La Plejaltulo havos por sxi pli komfortan spacon en la sxafa edeno.

NEVINO

Jen alterne kaj subite mi, hodiaù 18.01.08, ricevis ege gxojigan sciigon far mia filo Cid, kiu logxas en Porto Alegre: mia nevinoThielle sukcesis farigxi studentino en la sxtata Universitato (UFRGS) che la medicina fakultato, tuj je la unua provo, meze de milaroj da kandidatoj. Laù mi, meritoplena faro kaj premio por fraùlino 18-jara, post multaj monatoj da preparigxo dum kiuj sxi ignoris distrojn, la povra. Mi rajtas gxoji char sxi helpas pruvi ke ne chiuj Vaske, kiel mi, nur scias “flugi lante kaj malaltnivele” tra la homa gxangalo logxata de avidaj predistoj.

BIOFUELO

Jaron antaùe mia jxurnala kolumno Ekologio jam avertis legantojn, kiam Usono favoris la ideon ke Brazilo zorgu por produkti kaj vendi biofuelon al landoj bezonantaj tian brulajxon, ke tia ago povas farigxi malhelpa al nia lando char oni devas konsideri la eluzon de la fekundeco de la tero. Poste nialandaj veturigistoj devos multekoste akiri la brulajxon de la antaùzorgaj sxparintoj de sia grundo. Nun cirkulas tra la Internet, far la Eùropa Unio averto, ke la procezo produkti biofuelon povas rezultigi pli da poluo ol gxi helpos teni pura la medion !

EDUKADO

Montrigxas ke gepatroj ne scias aù ne volas eduki siajn gefilojn. Rezulto: mortigado per armiloj, per aùtoj, per veneno okazas tiomkvante ke sufichus sango por presi la jxurnalojn, anstataù per inko.Gepatroj kredas ke, se la knaboj ilin traktas per sinjoro, tio sufichas. Do kial la geinstruistoj ne forte premas la federacian estraron, ke gxi kreu unu Ministerion de Instruado kaj unu Edukan Ministérion cele eduki gepatrojn kaj infanojn.Chu la instruistinoj volas daùre suferi sxotojn kaj krachojn survizagxajn?

ELREVIGXO

Delonga tempo mi, eble vane, suspektas ke forta lingva hegemonio iel sukcesas telegvidi la estrarojn de chiuj E-movadoj. Se tio ne okazas, kiel ekspliki la fakton ke E-eventoj tra la mondo, inkl. nialande, ne akceptas la ideon malfermi brechon por ebligi al kleraj ne-esperantistoj spekti la varieteon kiu kutime enestas la kongresojn? Kial ne okazas festaj tagmangxoj en publikaj mangxejoj, kiel tiu de la 15ª/12/07? Tio ne okazas pro forgeso. Al pluraj LKK-anoj mi jam memorigis la rekomendon far UEA, nome, atentigi kaj inviti publikon ne-esperantistan kaj tio rememorigas nin pri nia veterano Sanguinetti, pro lia “NI DEVAS BRUI!”. Domagxe niaj gvidantoj preferas kasxi ke la E-movado alilande kubutumas sin antaùen kaj rikoltas sukcesojn. Se ne okazas misa telegvido restas la konkludo ke en Brazilo ni estas senhonte pigraj, konstatebla per tio, ke VKanoj emas ne parkerigi etan rimaron por per gxi montri al oportunaj interesatoj kiel nia lingvo belsonas! Kaj mi ech ne riskas sugesti aktivajxon kiuj iom elspezigas, kiel farigxi R-amatoro kaj gxui la vastan eblecon kontakti la tutan mondon,kie ajn troveblas gesamideanoj kaj esti aùdata de granda publiko chiam cheestanta en EchoLink kaj aliaj ejoj.

Bonhumoro:

SIMILECO

Virinoj samas indigxenojn. Kiam ili sin sxminkas, ambaù sin pretigas por estigi militon.

Pensiga:

MONO

Mono provizas eksterajxojn; neniam la kernon; Per mono oni achetas nutrajxon, ne apetiton; kuracilojn sed ne sanon; konatojn sed ne amikojn; servistojn sed neniam lojalecon; gajecon sed ne pacon kaj felichon.

LASTMINUTE:

Gaúcha modelo por esperantistoj. Nia diligenta amiko Arno (Arrojo do Mejo, nuntempe che la strando) telefonis al mi kaj manifestis gxojon post kiam li ricevis stakon da E-legajxoj, inkl.la revuon Monato. Gaje li diris en bona Esperanto: “mi legos kaj relegos gxis mi farigxos vera esperantisto” – Tiel modesta devus konduti chiuj gesamideanoj. Nur diri “mi amas Esperanton sed ne toleras lingvokontrolon, tiu devus honti.